

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,

Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

No 90 (Eighth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Decembro 1927

EUROPE'S FORTY TONGUES.

Western Europe, by which we mean the whole of Europe without Russia, is considerably smaller in area than the United States. and it rejoices in the possession of some forty languages. By languages we mean not local patois, which are innumerable, but only those dialects which are advancing definite political and cultural claims to recognition; those that are actually taught in schools, and in which books and papers are printed; those which, even though they are not officially established, are strong enough to create a "question"; those for the sake of which men are willing to fight or be persecuted.

If we err (in our computation) it is rather on the side of optimism. Italian, for instance, is counted as only one language, because there are no Italian dialects that are advancing political claims and creating a "question" as Catalan does in Spain. But Italian dialects still have a very real existence, and a man who knows only standard Italian will not find it easy to understand a conversation in the streets of Venice or Naples. But even if we admit that language affinities relieve the situation to some extent, they are far from helping us out of our worst difficulties. The former Hapsburg Empire, with an area scarcely one-fifteenth of that of the United States, had German, three groups of Slavic languages, two Ro-

mance languages, and Magyar. To learn a related language is no child's play; but to learn a language totally unrelated to your own is a tremendous undertaking. It involves the acquisition of thousands of words which have little in common with our native vocabulary, and the complete recasting of our habits of thought. It is not surprising therefore, that people should give up the attempt, and that, century after century, a French village should stand a few miles away from a German village, with an astonishingly small amount of infiltration from one language in to the other.

Salonica was Turkish for centuries, and is now under Greek rule: but the languages of its present and of its former masters are used only by minorities. At its very gates are found Macedonian peasants whose Slavic speech shades off imperceptibly from Serb to Bulgar, thus providing a battlefield for philologists and diplomats, a "question" drenched in blood and printer's ink. Rumanian (Kutzo-Wlach) and Albanian tribes hover near by, and the chief element of the city is Jewish. But these Jews, exiled from Spain years ago, still speak a Spanish jargon, instead of the Germanised Yiddish of most of their co-religionists. No wonder that there, as in Constantinople before the war, the current language should be none of these conflicting tongues, but French, in which the

best schools are conducted and the most widely read papers are published.

Minor Languages Will Live.

Minor languages cannot be killed, and they refuse to commit suicide. But are there not forces, deeper than man-made law, stronger than local pride or customs, that are making for increasing unity? The experience of the last hundred years is not assuring. It was a period of riotous nationalism. Nationalism has, no doubt, been a great power for good—if good be measured in terms of passionate collective effort. But it has also collected a heavy price. In reviving the Czech language the Bohemians erected a new fence between themselves and the rest of the world: the more purely Slavic the language, the more impassable the barrier. Catalonia is the most active part of Spain, and the Catalan language has a noble tradition: yet it seems a pity that this sturdy, progressive people should not be satisfied with Castilian, a beautiful tongue of worldwide availability. The Irish Free State will not let the Irish language fade away. It may even require every loyal Irishman to burden his mind with that venerable and impracticable instrument. In 1830 French was practically the sole culture language of all the Belgians. But the Flemings would have no peace until they secured for their Dutch dialect full equality with French, thus creating a linguistic barbed wire fence through a country about as large as Maryland and Delaware together There was no Rumanian literature until half a century ago. Norway was getting along with Danish as her official tongue, when some patriot discovered that the use of Danish was the badge of previous servitude. So against Danish, or Riksmå, a new "national" speech, the Landsmaal, was set up

Not that we mean to deride the unpractical, the quixotic attachment of each nation to its dialect, even though it be spoken only by a mere handful of men. The sentiment is respectable in itself, and from the point of view of the artist, it is justifiable. Local dialects alone are truly racy of the soil. They should bear fruit of richer flavor than the semi-artificial languages imposed by a central gov-

ernment. The world is richer for the Scotch of Burns, the Platt-Deutsch of Fritz Reuter, the Provençal of Mistral. The value of a violin is not measured by the volume of sound it can give out: such a test is legitimate only in the case of foghorns. The aesthetic value of a language depends upon the subtle harmony between the author and his public. The more intimate the circle, the more perfect the harmony—until we reach the ideal when author and public are one and the same, and use only the approved language of the mystic—silent ecstasy. The exquisite reaches but a few: what is common to a hundred millions must needs be commonplace. Every patois will remain, as long as there are men to cherish it, the language of the home, of poetry, and of prayer. But by the side of the local intimate speech, there is room for a simple, convenient neutral instrument, common to, all through which men will realise that a stranger may be a fellow-worker and a friend. In our splendid (American) isolation we are apt to misunderstand the bitterness of the need for an international language in Europe, and to ignore or belittle the efforts made in that direction. It is a practical problem in human reconciliation: and it deserves to enlist our sympathy.

— Albert Guerard: Beyond Hatred.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Por ŝpari la poŝtelspezoj ni kvitan-
cas la ricevon de donacoj kaj abonoj
jene:—(la daton post la nomo kaj
sumo, montras al kiu dato la abono
estas pagata) R. Banham, 4/6, okt.
'28; A. R. Cohen, 5/6 donaco, 4/6,
junio '28; A. H. McPhie, 10/6; F.
Tondut, 4/6, junio '28; J. Lonergan,
4/6, junio '28; C. A. Wittenback,
donaco 6/-, 4/6, dec. '28; C. W. Bal-
lard, donaco 1/-; Sino Stope, 9/-,
sept. '28.

*

Intruisto: "Kio estas fraŭlo?"

Lernanto: "Feliĉa homo."

Intruisto: "Kiu diras tion?"

Lernanto: "Mia patro."

Li: "Se mi nun ŝtelus kison de vi,
fraŭlino Emma, ĉu vi tre ektimus kaj
tuj poste krius?"

Ŝi: "Mi ja ektimus, sed ne povus
krii, ĉar eltiminte mi ĉiam estas
muta."

RECENZO.

"AŬSTRALIO: LANDO KAJ
POPOLO.

Grava Verko Aperas.

AŬSTRALIO: LANDO KAJ POPOLO. Originale verkita en Esperanto de A. Delsudo (Maurice Hyde) kaj Lauri Laiho. 93 paĝoj; landkarto en Esperanto, kaj 31 ilustraĵoj. Eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn en-Leipzig. Prezo 6ŝ. 6p.

Jen verko grava egale por nia lingvo kiel por nia lando. Tio ĉi estas notinda aldono al nia literaturo kaj samtempe valora propagando por nia nesufiĉe konata Aŭstralio.

La aŭtoroj, sinjoroj "Antono Delsudo" kaj Lauri Laiho jam ludis gravan rolon en la movado. Sinjoro Delsudo, kiu ial kaŝas sian veran nomon Maurice Hyde sub tiu plumonomo, estis la unua redaktoro de tiu ĉi gazeto, kaj ankaŭ estis prezidanto de la nacia Esperanto-asocio. Li esperantistiĝis kiel knabo, kaj la paso de la jaroj simple plifortigas lian entuziasmon por nia afero. Aŭstralianoj ankoraŭ lernas Esperanton el lia bonega lernolibro "The Esperanto Guide" aperinta antaŭ kelke da jaroj. Sinjoro Lauri Laiho estas Finno, kaj internacie konata Esperantisto; n partoprenis kelkajn universalajn kongresojn, kaj havas vere internacian vidpunkton. Li estas aŭtoro de kelke da Finnaj verkoj, kaj faris Finnlandadukon el unu Esperanta verko "La Konfeso," de Kroata aŭtoro. Sinjoro Laiho restis kelke da jaroj en Aŭstralio kaj Nov-Gineo, kaj kritike rigardis nian landon. Iom el liaj malĉaŝaj opinioj aperas en ĉi tiu libro.

Kiel rimarkigas la antaŭparolo, la aŭtoreco de la libro estas kredeble unika; unu el la aŭtoroj estas alilandano—Finno—vivinta en la lando, kaj la alia—Aŭstraliano, sufiĉe konanta sian landon. La impresoj de neŭtrala observanto estas du kunigitaj kun aŭtentikaj scioj de enlandano. Li ne konas alian geografian verkon, tiu samtempe prezentas du vidpunktojn pri la priskribata lando. Ĉu sukcesis tiu provo de nova metodo, tion povos juĝi la legantoj de tiu ĉi certe interesa verko.

Ne nur interesa, sed ankaŭ informoplena estas la verko. Neniu Aŭstraliano povos legi ĝin sen akiro de

novaj informoj pri sia propra lando. La titoloj de la ĉapitroj sufiĉe montras la enhavon: Ĉirkaŭ la Kontinento, Trans la Kontinento, Moroj kaj Kutimoj, La Sporto en la Aŭstralio Vivo, Regado kaj Politiko, Aferoj Spiritaj, Diversaj Notoj, Sancoj de Enmigranto, Eltrovo kaj Esploro, Historia Evoluo, kaj La Indigenoj.

Sekvas kelke da pagoj de statistiko pri diversaj temoj: klimato, loĝantaro, produkto, importado, eksporto, fervojoj, salajroj, ktp. Pro internacieco, la metra sistemo estas uzata por mezuroj de longo kaj areo, kaj temperaturoj estas montrataj laŭ termometro de Celsius (centgrada). Mono estas esprimita per funtoj sterlingaj, sed la simbolo (£) strange aperas post la ciferoj, kaj ne antaŭ ili. La indekso montras la prononcon de la propraj nomoj laŭ la alfabeto de la Internacia Fonetika Asocio.

La landkarto donas la ĉefajn nomojn en Esperanta formo, kaj montras ankaŭ la produktojn kaj industriojn. Ni rimarkis en ĝi erarojn: la fervojo inter Brisbane kaj Cairns estas jam finita kaj funkcianta, sed la karto tion ne montras. La du novaj teritorioj (Norda Aŭstralio kaj Centra Aŭstralio) estas montrataj laŭ siaj limoj, sed la nomoj ne aperas; aperas nur la malnova nomo Norda Teritorio.

La ilustraĵoj ŝajnas zorge elektitaj por ne tro laŭdi la landon, sed prezenti kiom eble fideblan bildon de ĝiaj diversaj partoj. Ilin disponigis al la aŭtoroj la Alta Komisario de Aŭstralio en Londono.

La libro estas bele bindita en tolo, kun frapanta ekstera papera kovrilo, kiu montras la sudan krucon en iom kurioza formo sur ruĝa fono kaj kelkajn karakterizajn bildojn el la libro. Ne ofte aperas Esperanta verko kun tia loga ekstero.

Kaj la enhavo? La enhavo montras fidelan klopodon prezenti nian landon al la alilanda leganto tia, kia ĝi vere estas, sen troa laŭdo, sen tro severa kritiko. Kaj en tio fariĝas videblaj la vidpunktoj de la du aŭtoroj. Sinjoro Laiho, Eŭropano, kutiminta la la ordo kaj oportuneco de Eŭropo, ne povas ne rimarki la malglatajn randojn, la krudecojn, de nia transplantita civilizo, kvankam li malavare konfesas niajn virtojn. Sinjoro Hyde, Aŭstraliano, kontraŭe vidas la progresojn de nia lando de

post la tempo, kiam aro da soldatoj kaj krimuloj komencis la unuan kolonion, ĝis la nuna epoko de grandaj urboj kaj kreskanta kulturo, kaj li miras pri niaj progresoj post tia malbonaŭgura komenco en lando de tia sovaĝa naturo. Ĉiuj flankoj de nia nacia vivo estas tuŝataj, praktikaj kaj spiritaj. Niaj problemoj estas montrataj, kvankam la verkantoj ne kuraĝas proponi solvojn; ili tamen ne detenis sin de esprimo de propraj opinioj, kaj oni ne povas esperi, ke ĉiuj Aŭstralianoj konsentos kun tiuj opinioj. Sed la aferoj, pri kiuj ne ekzistas diverseco de opinioj, estas trafe, eĉ iom sprite priskribataj. Ni konas malmultajn librojn, kiuj donas tiel fidindan kaj vivan bildon de nia nuntempa Aŭstralio.

De lingva vidpunkto la verko estas bona. La stilo estas plene internacia, kaj mankas strangaj vortoj. Nur "egocentra" (paĝo 49) ŝajnas fremda; kial ne "memcentra"? En la antaŭparolo aperas "majusklo" en la signifo "grandlitero, ĉeflitero," netrovebla en multaj vortaroj. Ankaŭ en la antaŭparolo (unua linio) estas skribita "ŝtato," kie devas esti "stato." Sur paĝo 43 "Anglikana literaturo" ŝajne devas esti "Anglikana liturgio."

Ni gratulas niajn du distingitajn samideanojn pro ilia sukceso farita laboro, kaj ni ankaŭ gratulas niajn samlandanojn pro apero de verko, kiu helpas forigi tiun vastan nescion pri Aŭstralio, kiu regas alilande.

DANCO DE SKELETOJ. Eldonejo Japano Esperanto-instituto, Uŝigome Ŝin' Ogaŭmaĉi 111-14, Tokio; prezo 1/- afrankita. La verko estas traduko de tri dramoj "Danco de Skeletoj," "Funto de Sudroj," kaj "Nokto ĉe Landlimo," verkita en Japano lingvo de s-ro Ujaka Akita, kaj tradukita de Hajime Suzui kaj Kaname Susuhi. Kiel ekzemplo de Japano literaturo ĝi indas legon kaj estas oportuna por porti en la poŝo.—P.H.

INTERNACIA DIALOGARO. Eldonejo Belgia Esperanto-Instituto, Kleine Hondstraat, 11, rue du Petit Chien; prezo 1/- afrankita. Vere praktika kolekto da originale verkita dialogoj kun elektita kaj utila vortrezoro el la ĉiutaga vivo. Taŭgas kiel kursa legaĵo en iom progresintaj klasoj. —P. H.

NOTINDA GVIDLIBRO.

Polujo-Danzig.

Jen la unua Esperanta kondukilo tra nun liberigita Polujo. Kiam, en 1912, oni eldonis kelkpaĝan libreton por la Oka en Krakovo, la lando ankoraŭ kuŝis sub centjare longa premado. Ĝojige estas, ke multe pli pli feliĉa aferstato regas tiulande ĉe enmondigo de la nuna, originale verkita sed el plej certaj fontoj elĉerpita prezentaĵo.

Kvankam ĝi ŝajne estas neoficiala, t.e., ĝi ne devenas el ŝtata turismo aŭ tia fako, ni tamen sentas plaĉon, konstati la fidon, kiun la Polaj Esperantistoj enkoras rilate la estontecon de sia brava lando (jam ne plu landeto, ĉar laŭ tersupraĵo ĝi efektive vicas kiel la tria inter Eŭropaj landoj; la kvina laŭ loĝantara nombro; la sepa laŭ loĝantara denseco; kaj krom nur Germanujo havas pli multe da arbarolandoj, ol la ceteraj.)

Kerneca komenco resumĉapitro, "Nuntempa Polujo," pritraktas historion, komercon, literaturon, kaj aspirojn. Tion sekvas kondukantaj paĝoj riĉe ilustritaj per fotografiaj, pri Warszawa, (elp. varŝava) Roznan, Wilno, Lodz, Bialystok (elp. bjaŭstok) kaj ĉiuj eĉ iom gravaj urboj. Tiam fine ni havas liston da U.E.A. delegitoj en 59 lokoj kaj pli ol 30 grupoj aŭ asocioj. Entute impresa 112-paĝa poŝlibro, kiun ĉiu interesusulo pri Polujo nepre posedu.

Oni devas streĉi la kritikemon trovi makulojn en ĉi tiu klare konsistigita gvidilo. Nebonaĵo estas iome senpripensa literado ĉe loknomoj, ekz., Warszawa, Varŝavo, apud "Varsovia," en "Warszawan"; Danzig, Dancig; neregula uzmaniero ĉe komencliteroj: — krakova, sed Viena; G (g) ermanoj; J(j)ezuitoj kaj simile. "Vojevodio" devas esti "vojevodo" post ekzemplo de plejbonaj verkistoj. "Plaĵo" (F. plage) povas demandigi kelkajn. Privat jam uzis "plaĝo." Same pri "gabineto" kaj "atiko." La enkonduko de "arraso," eĉ kvankam pripunktita, ŝajne estas nenecesa, ĉar jam ekzistas "tapiŝo" kaj "tapeto" uzotaj laŭnuance. Cetere duoblaĵn literformojn oni devas nepre eviti.

—Robo, Melbourne.

*

Neniam la juĵoj de la sinjorinoj estis tiel spritaj kiel nuntempe, ĉar —mallongeco estas la esenco de la spritaĵo.

KRONIKO.

MELBURNO, V. — Tre agrable por pieda promeno, estas la vetero en nuna sezono, kaj tial, kelkaj Esperantistoj ĝuis la piediron de Kew la rivero Yarra, ĉe Alphington. La vojo fariĝis tre belela ĉe la bordo de la rivero, kaj helkoloraj kanotoj pasis kaj repasis sur la riverakvo. En tiu loko, kie oni philargigis la riveron, estas bona naĝejo, kiu allogis multajn naĝantojn. Post mallonga restado tie, la anoj transpasis la riveron per neuzata fervoja ponto, kaj iom poste atingis la stacidomon, kie la vagonaro portis ilin hejmen.

Antaŭ ol lia foriro, s-ro E. Zscheile donis bonan paroladon pri siaj spertoj en Egiptujo. Lia rakonto pri amuzaj, kuriozaj kaj gravaj epizodoj dum lia restado en tiu lando, tre interesis la anojn. Li ankaŭ brodkastis de 3LO.

En la ĉambroj de la Melburna Esperanto Societo, la lasta dancado de la jaro okazis je la 18a de novembro. Nov. 25an, la anoj havis la plezurigan bonvenon la ekssekretario de la Perth Esperanto Societo, s-ro E. Maguire, kiu ĵus alvenis en ĉi tiu lando. Li faris mallongan paroladon pri sia restado en Suda Australio.

AUCKLAND, Nova Zelando. — La societo ĉi-tiea daŭras kun bonaj rezultoj sian agadon por disvastigi Esperanton. Ĉe speciala kunveno boneestita oni decidis okazi piknikon por festi la datrevenon de la naskotago de d-ro Zamenhof. La okazo estos ne nur festo, sed ankaŭ propagando, ĉar ordinare Esperantista pikniko altiras publikan intereson.

La multaj geamikoj de la ekssekretario de nia societo, s-ro R. J. Crago, gaje ricevis novaĵojn pri ties bonfarado en Aŭstralio. Koran saluton.

WELLINGTON, N.Z. — En ĉi-tiu kolono de la novembra eldono de S.K. aperis referenco pri gazeta polemiko. De post la tiu lasta raporto la pole-

miko daŭris, kvankam nune ŝajnas ke tio haltigis. Tute, preskaŭ dekkvin futoj da senpaga reklamo estis provizitaj al la legantaro; kaj notinde estas ke el tiom nur du futoj estis kontraŭ Esperantismo. Diversaj fakoj de la Esperanto-movado estis amplekse pritrakitaj de la korespondantoj; kaj vere estas diri ke neniam antaŭe nia lingvo ricevis tian bonegan publikecon. Kiel rekta rezulto de la polemiko la nove-starigita klubo ricevis kelkajn varbitojn!

S-ro King daŭras sian Esperanto-kurson de radio-stacio 2YA. Je skribdato 16 el kurso de 20 lecionoj estis brodkastitaj de tiu-ci potenca stacio. Menciinde estas ke la kurso finiĝos dum la vespero de la datreveno de nia mortinta Majstro.

La jena raporto pri la aferoj de la Esperanto-Klubo de tiu-ĉi urbo estas provizita angle por la informo de ne-Esperantistoj:—The Wellington Esperanto Club at a recent meeting passed a resolution to meet every Thursday evening at 8 o'clock, at 19 Tory Street. The Club is making steady progress. In order to provide the Clubroom with a piano, an Art Union has been organized, three local artists offering to paint original sketches for prizes. The necessity of encouraging the social side of the Club's activities has been realized, and the assistance of a piano will help to diversify the proceedings and attract the young people. The instruction classes are continuing satisfactorily. One or two short lectures are delivered every meeting, either on the movement generally or concerning an aspect of the grammar. The Secretary (Mr. Bertram Potts, 34 Argentine Avenue, Miramar, Wellington), will be pleased to welcome any visitors to New Zealand and to introduce them to the Club.

SYDNEY, N.S.W. — Tre ĝuinda vespero dum la pasinta monato estis tiu, en kiu s-ro Serišeff paroladis pri "Siberiaj Rememoroj." Krom interesega parolado pri sia patrolando, li montris al la aŭdantaro tre grand-

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malklare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posta. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

an kolekton da ilustritaj poŝtkartoj el Siberio.

Je la 10 la monato f-ino Fairfield aranĝis tre agrablajn koncerton, kaj en alia vespero s-ro Torr paroladis pri "Malnova Egiptujo."

La lastan dancadon ĉeestis anoj de la Internacia Polica Ekspedicio. Tiuj ĉi sinjoroj vojaĝas tra la mondo, senditaj de la Ligo de Nacioj, por propagandi pri la fondo de Internacia Polico. Kvankam ili portas militistajn uniformojn, ili propagandas pacon. Ili ne estas Esperantistoj, sed ili estas favora al nia afero.

NEWCASTLE, N.S.W. — Dum la lastaj tri monatoj s-ro F. Taylor (eks-prezidanto de la Sydney Esperanta Societo) kondukas klason kiu konsistas el naŭ anoj.

BRISBANO (Kvinslando). — La jarkunveno de la Brisbana Esperanto-Klubo okazis 22 novembro; prezidis la vicprezidanto, sinjoro Clement Kidd.

La jarraporto montris kontentigan progreson. La klubo gajnis 12 novajn anojn. Du kursoj estas starigitaj, kun 17 lernantoj, kies lernado estas ĝenerale kontentiga. En la kunvenoj de la klubo la uzado de Esperanto okupis konvene grandan lcon.

La radioparoloj de doktoro F. J. Williams kaj sinjoro Maŭrice Hyde dum julio, aŭgusto kaj septembro estis valora reklamo por la lingvo.

La klubo aĉetis libroŝrankon, kaj ĝia jam granda biblioteko estas riĉigita per kelkaj donacoj.

De financa vidpunkto la klubo estas en floranta stato: malofta afero ĉe esperantaj organizoj!

La nova estraro estas: Prezidanto, sinjoro Maŭrice Hyde; vicprezidantoj, fraŭlino Macpherson kaj sinjoro Klemento Kidd; bibliotekisto, sinjoro Oskar Behncken; sekretario, fraŭlino E. B. Carrick, al kies senlaca laborado la klubo ŝuldas grandaparte sian progreson.

La regna turistoficejo permesis alfikson de afiŝo en sia informejo, kiu donas adresojn de la delegito kaj vicdelegito de UEA kaj la sekretario de la klubo, kun la komenca frazo: "Vizitantoj! Ni plezure donos informojn."

La jsmalfermita filio de la mondkonata turisma oficejo Cook ankaŭ volonte permesis montradon de dua simila afiŝo.

Imitinda ekzemplo por aliaj urboj.

En fino de oktobro la klubanoj estis akceptitaj ĉe sinjoro Murray Fraser kaj sinjorino Rose Tate, (gefratoj de nia mortinta sindona klubano fraŭlino Marion Fraser) kie ili havis tre agrablajn kaj ĝuoplenajn posttagmezon kaj vesperon. Bonaj raportoj pri tiu ĉi festo ĉe la gastamaj gesinjoroj aperis en la gazetoj, kiuj cetere estas por ni tre favoraj.

A QUESTION OF TEXT BOOKS.

The much vexed question of, which constitutes the better text book for beginners—that based on a grammatical foundation, or one relying upon memory and reading—again comes before us in a letter which we print in this issue. The writer of the letter referred to, alludes to the suspension of publication of the well-known "Hydes Guide." We are not in a position to satisfy our correspondent in his desire to know whether a further edition will be published, but fully agree with him in his statement that the work of Mr. Maurice Hyde is "peculiarly suitable for Australian students of Esperanto." Most teachers experience a sense of something lacking when using a text book ostensibly designed for non-grammarians and it may be that the catering for this class of learner is detrimental to the proper development of Esperanto.

We shall be glad to publish the views of readers who have had experience in the use of both methods.

Editor, "La Suda Krucio,"

Dear Sir,

As a teacher of Esperanto I often am asked why "Hyde's Guide" is not used. I understand that this admirable book is out of print. Is it possible to induce the author to issue another edition? Without in any way depreciating the value of other text books I find that most students prefer a text book which is designed for persons having some grammatical knowledge. "Hyde's Guide" supplies this requirement, being clear, concise and simple, it is peculiarly suitable for Australian students of Esperanto.—Yours, etc.

INSTRUANTO.

CHAMBERS' ENCYCLOPÆDIA.

The new edition of this encyclopædia, perhaps the best known in this country after the Encyclopædia Britannica, will consist of ten large volumes costing £1 a volume. Volume IV contains a very favorable article on Esperanto, written by G. D. Lewis. The following extracts will be of interest.

"Among the numerous attempts which have been made during the past 300 years to establish an international or universal language, the greatest measure of success has attached to the project of Dr. L. L. Zamenhof, author of 'Esperanto,' a language which seems likely to realise in great part the hopes of its inventor. The reason of the success of Esperanto lies in the soundness of the principles on which it is compiled, which may be summarised in the words simplicity and internationality. The roots are so chosen that a great majority of them are common to several of the principal languages of Europe; grammar and phonetics are reduced to the simplest and easiest form. The foundation of the language consists of some 2,000 roots, 30 affixes and 16 grammatical terminations. The affixes allow a great reduction in the number of necessary roots; for example, the prefix mal, which reverses the meaning, has a great effect in reducing the vocabulary. In addition to the fundamental roots the language includes all such words as telephone, photograph, which are already international. The result is a language of remarkable richness and flexibility, as well as of extreme simplicity and regularity. The following are simple examples:

La instru-isto mal-permes-is la instru-istojn.
The instruct-or dis-allow-ed the teachers of that dangerous gas.

Por esti sukcesa politikisto oni devas ne esti timema.
To be a successful politician one must not be timorous.

Esperanto has proved itself capable of fulfilling the purposes for which it was designed, as it is used by a large and increasing number of persons for practical purposes, whether for commerce, study or recreation. Its practical usefulness as a spoken language has been amply shown at the many congresses which have been held, rep-

resenting some thirty nationalities. It has also a growing literature, of which the most important part consists of translations.

—El The British Esperantist.

VERKEMULOJ, LEGU!!

"La Lingvaj Institucioj devas konstante kaj persiste atentigi la Esperantistaron pri la neceso de unueco, de korekteco, kaj de komprenebleco. Ĉiu povas facile kaj bedaŭrinde konstati, ke multaj pecoj en la artikoloj, kiujn publikigas niaj, eĉ plej gravaj, gazetoj, estas internacie kaj eĉ home nekompreneblaj kaj ŝajnas esti skribitaj en kvar aŭ kvin diversaj dialektoj La sola timinda danĝero por vivanta lingvo kiel Esperanto tute ne estas la ŝtoniĝo, fakte neebla, sed la sistema kaj precipe la sencia kaj senzorga alieco kaj la disfalo en dialektojn, se ĉiu rajtas fuŝi la lingvon laŭ sia sistemo aŭ pro sia nescio, senpenso kaj malatento . . . Niaj plej timindaj malamikoj ne staras ekster niaj vicoj: ili staras inter ni, ili estas tiuj, kiuj pro nesufiĉa lernado kaj tro frua verkemo kaj presiĝemo enkondukas senrespekto en la presan lingvon la neeviteblajn malkorektaĵojn de la buŝa lingvo kaj naciigas la internacian lingvon. 'Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia,' diris Zamenhof." (El "Esperantista Dokumentaro." Edinburgh Kongreso). Tiurilate ni studu la konsilon de prof. Cart. "En Esperanto estas nur: (a) unu stilo regulo: skribi plej klare. Kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; (b) unu malpermeso: skribi malklare. Kio ne estas klara, tio povas iafaje esti korekta, sed neniam bona."

INTRODUCTION OF ESPERANTO IN THE JUGOSLAV RAILWAYS.

By decree of 21 March (G.D. No. 6071/927) the Ministry of Communications of the Kingdom of the Serbs, Croats and Slovenes has decided to use Esperanto as an auxiliary language for placards and announcements to passengers on international trains.

—I.E.S.

LONDONA GAZETO, AŬSTRALIO KAJ ESPERANTO.

La semajgazeto "The British Australian and New Zealander," aperanta en London, en sia numero de 29 septembro donas kelkan spacon al Esperanto.

Aperas tutkolona intervjuo kun sinjoro J. G. Pyke, malnova Melburna esperantisto nun vojaĝanta en Europo, kiu rakontas pri la alta valoro de nia lingvo laŭ sia praktika kono: ĉe la Danziga kongreso kaj en la Balkanaj landoj. La gazeto ankaŭ presas portreton de nia samideano.

Sub la titolo "Australia in Esperanto" la gazeto donas mallongan recenzon de la verko "Australio: Lando kaj Popolo" de niaj samideanoj Delsudo (Hyde) kaj Laiho, atentigante pri tio, ke oni jam uzas la internacian lingvon por diskonigi la aktualajn faktojn pri nia lando. La libro estas vendata de la librejo apartenanta al la gazeto (British Australian Book Department) kaj ankaŭ de la librejo en la luksa "ambasadorejo" de Aŭstralio en London, "Aŭstralio-Domo."

SLOSILO DE ESPERANTO EN JUDA LINGVO. Laŭ la iniciato de Int. Centra Kom. de la Esp. Movado eldonita de J. Šapiro, Lipowa 33 Bialystok/Polujo/. Traduko de I. Lejzerowicz, L.K., redaktita de la eldoninto. 44 paĝoj kaj kovrilo. Prezo 0,20 sv. fr. aŭ egalvaloró.

SPIRITAĴ.

Vendisto: "Ĉi tiun maŝinon mi tre povas rekomendi al vi, ĝi faros sin mem pagita."

Kliento: "Estas bone, kiam ĝi estos farinta tion, vi povos sendi ĝin al mi."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 15; British Esperantist, 271; Bulgara Esperantisto, 1; Belga Esperantisto, 8, 9; Bulteno de Internacia Scienca Asocio E., 8; Bulteno de E. Preso-Agentejo, 5; Germana Esperantisto, 10; Heroldo de Esperanto, 38, 39, 40, 41; Inform-servo de a Internacia Laboro Oficejo; International Language, Okt.; La Unuigita Tuthomaro, Okt., Nov.; La nova Tago, 3; La Suno Hispana, 124, 125; La Fervojisto, 1-2; La Lernanto, 51, 52; La Vojo de Klerigo, 5, 6-7; La Revuo Orienta, 11; Oomoto Internacia, 20-21; Pedagogia Revuo, 9, 10; Pacifika Espero, 27, 28; Svenska-Tidningen, La Espero, 8-9, 10.

BRISBANE ESPERANTO CLUB kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.t.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.t.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobart Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidentino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.